


FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUTSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)

INTERŜANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

FELIĈAN KAJ PROSPERAN NOVJARON!
AL ĈIUJ F. U. K. E.-ANOJ!

Sub la verda stelo

ĈE LA ENIRO DE LA NOVA JARO

Antaŭ kelka tempo samideano skribis al mi kaj urĝe insistis por ke mi ne forlasu la esperanto-movadon, kiam • ĉiuj manoj estas nepre • bezonataj sur la ferdeko. Se ni stagnacias surloke en Flandrujo, ni devas vastigi nian horizonton kaj tiam ni spertos ĝojigajn progresojn en multaj landoj, ne nur la okulfrapajn • antaŭenmarŝojn en Nederlando, Danujo kaj Svedujo, sed ankaŭ la obstinajn klopodojn en grandaj landoj kiel Francujo kaj Britujo. •

Nu, mi tute ne forlasas la esperanto-movadon sed samtempe utiligas ĝin al miaj katolikaj konvinkoj, kaj kvankam mia tempo estas ŝpareme rezervita al libera laboro, mi ĉiutage volonte rezervas lokon al esperantista propapando kaj korespondado, mi fieras pri la agado de F.U.K.E., kies prezidanto mi restos, ĝis kiam bonvolema kaj agema samkredan(in)o volas anstataŭi min. Ni tute ne stagnacias surloke, ni venas en la katolika kampo je la dua vico kiel landa ligo, la unua estas la Nederlanda. Kaj kun la helpo de niaj Nordaj gefratoj, ni esperas daŭrigi nian laboregon, nian propagadon, sub la gvidado de la nuna estraro, kies membroj ĉiuj streĉas siajn fortojn por krei simpatian atmosferon en katolikaj medioj rilate al Esperanto. La multnombraj artikoloj en ĵurnaloj, revuoj, la paroladoj publikaj,

la persona propagando de niaj anoj pruvas tion.

Ni jam en 70 flandraj komunumoj havas membrojn, inter kiuj estas pli ol 30 ekleziuloj, nia revuo aperas sub presita formo ĉiumonate plibeligita kaj kvankam malgranda ĝi plaĉas al ĉiuj, mi ricevas ĉiutage almenaŭ unu esperantan leteron kaj en tio mi certe ne superas nian sekretariojn.

Ĉio ĉi ne por fanfaroni sed por montri al la malkuraĝuloj ke 1936 estos sukces-, fruktoplena, progressa jaro por Esperanto en Flandrujo kaj speciale en la servo de la Eklezio kaj de Dio.

LA PREZIDANTO

" FLANDRA KATOLIKO "

Jen la efektiviĝo de multjara dezirego. Depost la fondiĝo en 1934 de F.U.K.E., mankis organo, kiu prizorgus la vivplenecon de nia unuiĝo, kaj estus ĉenero inter la membroj kaj la estraro. Anstataŭ la flugfolioj, kiuj de temp' al tempo aperis, kaj " Kath. Esperanto-Bulletijn ", la estraro post peno priparolado, decidis presigi oficialan organon sub la nomo de " Flandra Katoliko ".

Post la provnumeroj la estraro spertis grandan plezuron. Gratuloj alvenis kaj la multaj leteroj esprimis : • Bonvenon •, kaj deziras al ĝi ĉiaman pliampleksiĝon kaj pliboniĝon.

" Flandra Katoliko " estas nia estonteco. La redakcio faros sian eblon por igi ĝin kiel eble plej interesa laŭ katolika, flandra, kaj esperanta vidpunktoj, por ke ĉiuj membroj spertu ke ĝis nun mankis simila organo en Flandrujo.

" Flandra Katoliko " devas plenumi altrangan

taskon : ĝi estas la interpreto de niaj deziro kaj idealo : meti Esperanton je la servo de la eklezio, propagandi nian sanktan kredon inter la Esperantistoj, kaj pere de Esperanto fortiĝi la pacon en la regno de Kristo.

Ni dankas niajn Honormembrojn kaj bonfarantojn : al ili ni multe ŝuldas. Ni danke pensu al niaj viglaj anoj kaj anoncantoj. Dank' al ilia laboro, la estraro finance kapablis eldoni la revuon. Kaj laste ni dankas niajn kunlaborantojn, kiuj sendas interesajn artikolojn, kaj finfine la presiston, kiu bone prizorgas la eldonadon. Al ĉiuj dankon.

Ni esperas ke ĉiuj F.U.K.E.-anoj ŝatos tiujn klopodojn kaj efike propagandos por nia ĉiesa organo.

Ĉiam antaŭen...

Jen estas nun " Flandra Katoliko ", freŝa, juna, vivplena. Faru de ĝi fortan organon, kiu post nelonge estos inda je nia katolikeco kaj solidareco.

La nova jaro ĵus komencis, kaj laŭkutime oni sendas bondezirojn kun donaco. Kio por ni estas pli agraba por donaci ol abonon al " Flandra Katoliko " ? Tial, karaj gemembroj, ne forgesu nian organon, rekomendu ĝin al viaj amikoj kaj konatuloj, kaj subtenu ĝin al la konkuro. Dum tiu ĉi monato la novaj abonoj devas surprizi la sekretariojn per dekoj, eĉ centoj...

Antaŭen...

LA ESTRARO

La katolika esperanta vivo GODSDIENSTIG HOEKJE

Weer een nieuw jaartje dat begint voor ons dierbaar Vlaamsch Esperanto Verbond. Ons tijdschrift heeft een heel nieuw kleedje gekregen en mag voortaan gelijk gesteld worden met de andere degelijke buitenlandsche Esperanto-tijdschriften. Hiervoor onzen innigsten dank aan 't onverpoosde werk van voorzitter en sekretaris die steeds in de bres springen waar 't het Kath. Esperantisme geldt.

Ook als katholieke vereeniging willen we op gelijken voet staan met de andere K. A. (Kath.

actie) groepeerings ; het past bijgevolg dat we ook hier de algemeene richtlijnen der K. Actie volgen.

Voor Januari hebben we als intentie voor het apostolaat des gebeds : de waardeering van de gave van het geloof. Dit kunnen we toepassen op onze broeders esperantisten uit het buitenland, waar er helaas zoo weinigen onzen godsdienst kennen en waardeeren. Het heerlijke werk van het Internationaal Katholiek Informatie Bureel I.K.I. uit Nederland geeft ons daar de meest sprekende bewijzen van.

Broeders, laat ons deze maand bidden opdat er door toedoen van dit informatie bureel, dat tevens een missiewerk is, en dat reeds zooveel bekeeringen heeft bewerkt, steeds meer en meer esperantisten onzen godsdienst leeren begrijpen en terug komen tot de Moederkerk van Rome dank aan Esperanto. Unu ŝafejo kaj unu Paŝtisto.
A. B.

R. K. ESPERANTO-DAG te Ginneken op Zondag 15-12-1935.

Een prachtige vergadering waar Z. Hoogweerdigheid Mgr Hopmans bisschop van Breda het woord voerde. Z. H. legde er bijzonder nadruk op dat de Kath. Esp. beweging door de Priesters zoude gesteund worden en drukte de wensch uit dat na verloop van enkele jaren de Kath. Esp. beweging zich over Zijn geheel Bisdome zal hebben verspreid.

Op 29 Dec. II. hadden wij het genoegen Frater Wigbertus Van Zon vóór het micro van de K.R.O. te hooren handelen over I.K.I. (Internacia Kat. Informejo) de toespraak die in het Esperanto gehouden werd was zeer interessant. Mochten wij in Vlaanderen ook eens het geluk beleven zulke puike kath. Esp. voordrachten te mogen beluisteren !

De Esperanto-wereld WEENEN 1936

Het 28^{ste} Internationaal Esperanto-Kongres zal van 8 tot 15 Oogst 1936 plaats hebben te Weenen. Er wordt een groote deelname verwacht, aangezien de plaats in 't hartje van Europa ligt. Weenen is bij uitstek een Esperanto-

stad. Men hoeft slechts te denken aan toeristische uitgaven, aan het Internationaal Esperanto-Museum, enz. De Oostenrijksche regering heeft een subsidie van 7.500 Schillingen toegekend. Op het programma staan vele aantrekkelijkheden, waaronder talrijke excursies doorheen het land, een balavond onder naam van : " Het Kongres danst ", opvoering van de première in Esperanto van de gekende operette : " In 't witte paard " .

Alle belanghebbenden kunnen van nu af elken Woensdag luisteren naar desbetreffende berichtgeving door Radio-Wien, onmiddellijk na den specialen esperanto-cursus, van 18.30 tot 19.00 uur (M. E. T.).

Literaturo-Legaĵo

ROKAJ PREĜEJOJ EN LA KORO DE ABESINIO

La dekunu preĝejoj de Lalibala, hakitaj peco post peco el unu masiva ŝtonego.

Laboro de jarcentoj, pri kiu nur kelkaj legendoj estas konataj ĝis nun.

Kiel daŭra memorigaĵo de la prosperado de la Kristaneco en Abesinio estas ankoraŭ konservata arĥitektura miriglaboro, kiu estas unikspeca en la mondo, kaj atestas la aŭtenton, sed ankaŭ la piecon de la tiamaj regantoj kaj donas indan pruvon de la kono de l' popolo.

Proksimume dek tagmarŝoj enlanden de Adua troviĝas la neforgeseblaj rokaj preĝejoj de Lalibala, kiuj ĉiuj estas hakitaj el naturŝtono. Ĉar Abesinio dum jarcentoj, restis fermita por la Eŭropanoj, kaj ĝia historio dum tiu ĉi tempo estas malklara, tiuj ĉi preĝejoj estas kvazaŭ nekonataj. Verŝajne Alvarez, kiu venis en Abesinion en la jaro 1520 kun la ekspedicio de Don Rodrigo de Lima, estis la unua Eŭropano, kiu vidis tiujn preĝejojn.

Ĉiaokaze estas de li la unua sciigo pri tiuj ĉi konstruaĵoj. Li donis precizan priskribon pri la rokaj preĝejoj de Lalibala. Li estis tiel trafita per la spektaklo, ke en siaj komunikaĵoj li esprimas la timon, ke oni ne volos kredi liajn vortojn, kaj tial li finskribis :

« Mi ne povas plue informi pri tiuj ĉi konstruaĵoj, ĉar ŝajnas al mi ke, se mi pli multe skribus,

oni ne kredus min. Tamen ĉar mi jam estas kulpigata kiel inventanto pro la nemulto skribita, mi ĵuras per Dio, je kies povo mi staras, ke ĉio, kion mi skribis, estas la vero, kaj ke tie ankoraŭ estas pli multe ol mi jam skribis. »

La angla esplorvojaĝintino Rosita Forbes M. Grath, en geografia revuo publikigis, antaŭ kelkaj jaroj, pli malfruan komunikaĵon. Ankaŭ ŝi estis trafita per la aspekto de la rokaj sanktejoj. Ŝia priskribo estas proksimume laŭjane :

« Oni preskaŭ ne povas kredi ke la dekunu preĝejoj de Lalibala estas konstruitaj entute el ŝtonego. Unue, oni devas prezenti al si ke la konstruo de tiuj ĉi sanktejoj estas farita inverse. Ne koncernis tie ĉi amasigi ŝtonon sur ŝtono en ebena supraĵo, male, oni enpenetris la rokamason, fosis profundajn larĝajn ebenaĵojn, kaj en la centro oni lasis grandegan ŝtonegon, el kiu la preĝejo estis konstruota. Poste oni kavigis la internon de la preĝejo, skulptis la kolonojn, altarnicojn kaj fenestrojn. Proksimume tiamaniere fariĝis la plivastigo de la konstruaĵo.

La unuaj forhakitaj malaltaj placoj formas nun la galeriojn de ĉiu preĝejo kaj estas apartigitaj per muroj. En la centro de tiuj ĉi placoj sin levias la preĝejoj, kies arĥitekturaj linioj eksterordinare faras impreson per la eleganteco de siaj formoj kaj ornamoj. Laŭlonge de la ŝtonegmuroj, ĉirkaŭantaj tiujn ĉi sanktejojn, troviĝas la monaĥaj loĝejoj, kunligitaj per malaltaj galerioj. Kiam oni staras sur unu el la de kvar ĝis ses metrojn altaj muroj, apartigitaj la preĝejoj-placojn, kaj ankaŭ hakitaj el ŝtonego, tiam oni povas vidi labirinton de koridoroj, galerioj kaj arkaĵoj. De tie oni povas rekoni kaj kompari la influon de la diversaj artlernejoj, kaj prezenti al si la nekompreneblan aplikon de la laborenergio, necesa por tiu ĉi artaĵo. »

El de Kath. Wereldpost
Esperantigis
Joz. Cammaert

(Daŭrigota)

Pacmovado

" MI NE POVAS PORTI ARMILOJN "

Pastro René Jostin suferas unu jaran malliberigon en la militkarcero de la Cherche-Midi en

